

PRI KUNSIDO DE LA KOMITATO

Pasis kelkaj monatoj post la kunsido de SEJM-Komitato en Moskvo, kaj la komitatanoj denove renkontiĝis por persone pritrakti la gravajn demandojn, akumuligitajn intertempe. Ĉi-foje la loko de la kunsido estis Vilnius, daŭro - du tagoj: la 4-an - 5-an de junio. Partoprenis la komitatanoj: M. Brzostejn (la Komitato restarigis al li la komitatanaĵajn rajtojn por la tempo de la kunsido), A. Melnikov, V. Aroloviĉ, D. Gibulevskij, P. Jegorovas.

La Komitato pridiskutis la staton de preparado de OkSEJT-19 kaj OrSEJT-19 kaj konstatis, ke la preparlaboroj de ambaŭ tendaroj pasas ĝenerale kontentige. Nun la sukceso de SEJToj dependas plejparte de la SEJM-kluboj kaj aktivuloj, ĉar ĝia linio en la listoj de tendaraj laboroj, ĝia ero en la programoj bezonas konkretajn plenumontojn, kiuj prizorgu siajn taskojn laŭeble anticipe. Lige kun la fakto, ke la partoprenkotizoj de ambaŭ SEJToj estas malkonformaj al la decido N-42 de la 10-a Konferenco, la Komitato opinias necesa klarigi, ke fiksi tiajn kotizojn la organizantoj estis devigitaj pro kaŭzoj, ne dependantaj de SEJM.

La Komitato komisiis al V. Aroloviĉ reprezenti interesojn de SEJM kaj prizorgi konformajn aranĝojn en kadroj de BET-18 (Latvio, fine de julio).

Gravan atenton donis la Komitato al la antaŭstaranta 11-a Konferenco de SEJM-Konsilantaro. Post verve diskutado la komitatanoj decidis aboli la ĝeneralajn klubajn raportojn, por ke la kluboj raportu pri siaj spertoj laŭ apartaj temoj. La liberiginta tempo ebligis trakti la temojn pli fande. Anstataŭ pri la tradiciaj vesperaj disputoj estos novaj momentoj. Unue, al la disputoj aldoniĝos intermite prolegoj; due, ili pasos ne post, sed antaŭ la vespermanĝo, do la tagaj debatoj finiĝos ion pli frue. La postvespermanĝo tiampon la konferencanoj povos pasigi pli liberforme: lernado de novaj kantoj, societaj ludoj ktp. Kiel ĉeftemo de la Konferenco estas fiksa "Peresperanta societala laboro de SEJM-kluboj" - temo sendube ege grava, presipe en la jaro de la jubileo de Oktobro. Do, prilumo de nia ekstermovada laboro, analizo de la atingoj kaj mankoj, konkludoj por estonte troviĝos en la atentocentro de la Konferenco. La Komitato alvokas la SEJM-klubojn kaj aktivulojn partopreni afereme pridiskuten de la ĉeftemo kaj aliaj temoj de la Konferenco, kies proksimuma plano estas publikigata sube.

La komitatanoj prezentis por la kunsido siajn proponojn pri la perspektiva 5-jara laborplano de SEJM. Post pridiskuto estas decidite aperigi ilin en "Aktuale" kiel projekton, por posta analizo, kompletigo kaj definitiva konfirmo fare de la Konferenco. Tia projekto estas prezentata sube.

La Komitato analizis la staton de kluba raportado kaj konstatis, ke tro multaj kluboj ĝis nun ne raportis pri la unua periodo. La Komitato ankoraŭfoje memorigas al tiuj kluboj pri ilia devo kaj proponas sendi la raportojn almenaŭ pri ambaŭ periodoj kune.

La komitatanoj dankas al Honora Aktivulo de SEJM V. Silas, kiu ĉeestis konsulte dum pridiskuto de kelkaj demandoj kaj donis utilajn konsilojn.

V. Aroloviĉ, vicprezidanto de SEJM.

La Komitato de SEJM notis, ke vicprezidanto de SEJM N. Gilinskij, malgraŭ pluraj avertoj, konstante neglektis siajn komitatatajn de-vojn, kaj decidis eksigi lin pro tio el la Komitato.

PROKSIMUMA PLANO
de la 11-a Konferenco de SEJM-Konsilantare

La alvena tago - 12.8.

Registriĝo de la konferencanoj. Organiza kunveno. Kunsido de la Komitato.

La unua tago - 13.8.

Malfermo de la Konferenco.
Analizo de Decidoj de la 10-a Konferenco. (P. Jegorovas)
Peresperanta soci-utila laboro de SEJM-kluboĵ. (V. Samsdaj)
Faka agado en SEJM. (V. Sapojnikov, fakestroj)
D i s p u t o : SEJM-representanto - centra figuro en la vivo de SEJM.

La dua tago - 14.8.

Faka agado en SEJM (daŭrigo).
Informa laboro en SEJM. (A. Medinŝ)
Internacia laboro de SEJM-kluboĵ. (A. Melnikov)
P r e l e g o : Junulara E-movado en Europe. (A. Melnikov)

La tria tago - 15.8.

Analizo de la sperto pri organizo kaj efektivigo de OrSEJT-19 kaj OkSEJT-19. (Representantoj de Kluboĵ-Mastroj kaj Tendaraj Est-raroĵ)
Interna informado en SEJM. (V. Aroloviĉ, V. Silas)
D i s p u t o : Rolo de subtenantoj en SEJM.

La kvara tago - 16.8.

Financa raporto. (D. Gibulevskij)
SEJM-kluboĵ renkonte al la 60-jara jubileo de Oktobro: la rezu-
ltoj de la socialisma konkurado. (P. Jegorovas)
Kandidatigo de novaj kluboĵ al SEJM.
Reelektado de la SEJM-Komitato kaj fakestroj.
P r e l e g o : Kiel eduki gvidantoj? (V. Silas)

La kvina tago - 17.8.

Perspektiva laborplano de SEJM. (A. Melnikov)
Akcepto de Decidoj.
Fermo de la Konferenco.
D i s p u t o : Opinioj pri laboro de la Konferenco.
Kunsido de la nova SEJM-Komitato.

PROJEKTO DE PERSPEKTIVA 5-JARA LABORPLANO DE SEJM

1. Konstante levi la ide-politikan nivelon de E-junularo.
2. Utiligi Esperanton por propagandi la sovotan ideologion kaj la kulturojn de sovetaĵ popoloĵ okaze de gravaj internaciaĵ aranĝoĵ (ekzemple, Olimpikaj ludoĵ en Moskvo).
3. Atingi normalajn kunlaborajn rilatoĵn kun la E-Komisiono de SSOD.

4. Atingi, ke ĝiaj aktivaj E-fortoj en Sovetio agu unuece kun SEJM.
5. Laŭeble fondi E-klubojn en: a) ŝefurboj de uniaj respublikoj; b) ŝefurboj de autonomaj respublikoj; c) regionaj kaj provincaj centroj.
6. Stimuli interlingvistikajn sciencajn esplorojn, kontribui al la agado de la Problema grupo pri interlingvistiko.
7. Kompili E-fakterminarojn, bezonatajn en diversaj sferoj de socia vivo, kaj klopodi pri ilia aperigo.
8. Firmigi kaj vastigi ligojn inter SEJM-kluboĵ kaj E-kluboĵ de socialismaj landoj.
9. Modernigi kaj variigi formojn kaj enhavon de amasaj aranĝoj por E-junularo.

KIE ESTAS VIAJ INFORMAJ FAKOJ?

Propaganda fako de SEJM sciencas atendas reĝojn al la artikolo en "Aktuale" (N-7, p.70 - 71) - ĉiuj reĝis nur la kluboj, kiujn la estro de P.P. visitis mem. Komprenu gravecon de la organizita informado!

Estas sendube, ke multe estas jam farita kaj plu farata por diskonigi la lingvon, sed estas ankaŭ certe, ke plimulto estas farebla kaj faranda. Tio rilatas al ĝiaj aspektoj de la informado, sed precipe al interna organiziteco, amasigo kaj plibonigo de la kvalito. Por plibonigi la informadon necesas: unuflanke, pli kunligi la ekzistantajn informajn fakojn kaj aliajn centrojn de informado, kaj aliflanke, funkcioigi la novajn. Kelkaj kluboj jam havas siajn IP, sed multaj aliaj ne formas tiajn. Urga tasko estas krei ilin. La informado nuntempe devas esti sfero ne senpripensa, hazarda aŭ epizoda, sed daŭre studata, bone planita kaj sistema. Tion plej sukcese povas realigi aparta fako aŭ almenaŭ kompetenta komisiito en la klubo.

Plifortigo de la organiza strukturo aŭtomate kaŭzos amasigon de la informado. Fakte eĝ portado de E-insigno aŭ simpla konvergencio (ne altruda, sed natura) en flua Esperanto apogas la informadon eĝ la plej ĝenerala senco de la vorto. Des pli helpas skribado de taŭgaj leteroj al la redakcioj. Por altigi la kvaliton de nia informado, estas necese akcenti ĝin, kio montras la kulturen kaj praktikajn valorojn de la Internacia Lingvo. Grava tasko estas liveri objektivajn sciigojn kaj klarigojn pri la Esperanta traduka kaj originala literaturo, sciencaj verkoj, Someraj Universitatoj, radioelsendoj, aplikoj de la lingvo dum vojaĝoj kaj en profesia laboro, pri niaj SEJtoj kaj rekontigoj. La esenca postulo estas absoluta objektiveco: nek troigo de atingoj, nek prisilento de realaj sukcesoj.

Afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj, sloganoj devas esti ne nur celtrafaj enhavo, sed ankaŭ modernaj laŭ la aspekto; alie eĝ la plej bona enhavo povas esti komplete detruita pro la malmoderna, kelkfoje vere mizera aspekto. Se la afiŝo ne estas taŭge prezentita, oni kutime atingas precize la malon de tio, kion oni celis: anstataŭ altiri la publikon, oni malproksimigas ĝin.

Estas aparte atentinde, ke oni ĝiam skribu pri Esperanto en korrekta nacia lingvo. Se teksto, maksimume perfekta el lingva vidpunkto, per si mem donas prestiĝon al la enhavo, de malbona lingvo kun multaj gramatikaj eraroj kaj mizera stilo ne nur ruinigas eĝ la plej saĝaj argumentadon, sed ankaŭ per si mem estas rekta propagando kontraŭ Esperanto. La homoj prave diras: unue lernu vian propran lingvon, kaj poste parolu al ni pri Esperanto.

Informado, eĝ plej trafa, apenaŭ havas senco, se ĝi ne estas ligita al la du aliaj ĉefaj branĉoj de aktivado: instruado de la lingvo kaj ĝiaj praktikaj aplikoj en la plej vasta senco de la vor-

to. Nur bone studita kaj planite, celkonscia, paralela agado sur la tri kampoj donas kontentigajn rezultojn kun ĉaura valoro.

Fonda klubajn informajn fakojn, nur tiameniere ni povos atingi, ke nia lando estu maksimume kovrita per la reto de informa aparato de la organizita Esperanto-movado.

L i t e r a t u r o : Jarkolektoj de la revuo "Esperanto" (UEA) 1970-1973. "Principare de Frostavallen".

A. Medinš, estro de Propaganda fako.

PRI EKSPOZICIOJ ONI DEVAS PAROLI SERIOZE!

Por erike informi pri Esperanto, ni devas aranĝi bonkvalitajn ekspoziciojn. Generale ni uzas tri kategoriojn de ekspozicioj: a) grandamplaksajn, konstantajn; b) porteblajn, mezgrandajn por lernejoj kaj bibliotekoj; c) okazajn, kiuj gkompanas prelegojn.

Pri grandaj ekspozicioj. Unue antaŭ kelkaj monatoj elektu ekspozician komitaton, kies tasko estas trovi taŭgan ejon, prizorgi dekoradon dum la ekspozicio kaj necesan reklamen. La materialo devas esti kiel eble plej abunda, ĝi devas enhavi ankaŭ plurajn bonkvalitajn grafikaĵojn, kiuj montras ekzemple la nombron de lernolibroj, la manierojn laŭ kiuj oni lernas Esperanton, la nombron de libroj kaj broŝuroj en Esperanto, la evoluon de la Internacia Lingvo en ciferoj, la nombron de radiceleŝendoj, la disvastigitecon de Esperanto kaj la mondan etendiĝon de la E-movado. Ekzemple, estus bone, se ie troviĝus mapo kun notitaj SEJM-klubo.

Eldiroj de famaj personoj devas ankaŭ troviĝi en la ekspozicia materialo. Dum SEJT-18 ni konvinkigis, ke ĝi tiu parto de ekspozicio havas aldone fortan impreson, se estas trafaj citaĵoj kun aŭtore foto.

La ekspozicio devas okazi en vere taŭga ejo, ekzemple universitato, kulturdomo, kinejo aŭ io simila. Por ke la ekspozicio estu bone vizitata, necesas multe reklami ĝin per ĉiuj eblaj manieroj: afiŝoj, anoncoj en gazetoj, informoj per radio aŭ televido, personaj invitoj al reprezentantoj de kulturaj instancoj, invitoj al lernejoj aranĝi kolektivajn vizitojn, ktp.

La deĵorantoj de la ekspozicio devas bone scii la historion de E-movado, ĝian nunan organizan staton, esti kompetentaj pri ĉiu fakoj de la ekspozicio. Estas neallaseble, ke la deĵorantoj ne povu respondi al iu demando. Dezirinde, ke en ekspozicio estu montrataj jenaj fakoj: lernolibroj, vortaroj; verkoj de L.L. Zamenhof; tradukita beletra literaturo; nacilingvaj tradukoj el Esperanto; originala beletra literaturo; scienca literaturo, inkluzive fakajn vortarojn kaj terminarojn; arto, nome tradukoj kaj originalaj verkoj pri arto; radio kaj muziko (oni havu eblecon disaŭdigi bonajn E-diskojn aŭ sonbendojn); fotostando pri renkontiĝoj; gazetoj kaj revuoj; nacilingvaj verkoj kaj broŝuroj pri Esperanto; turismo (gvidlibroj, prospektoj, reklamoj); filatelo (poŝtmarkoj kun E-teksto, glumarkoj, poŝtaj stampej); E-insignoj, emblemoj kaj diversaj esperantaĵoj.

Por ke la ekspozicio donu bonajn fruktojn, estas utile havi en la ekspoziciejo specialan budon, en kiu, se iel eble, oni vendas lernolibrojn kaj vortarojn kaj registras dezirantojn por E-kurso.

Dum aranĝado de mezgrandaj ekspozicioj eblas utiligi porteblajn kaj faldeblajn tabuletojn ("planŝetojn"), abunde uzante fotomaterialojn kaj diagramojn laŭ supremencitaj temoj. Propaganda fako de SEJM nun selektas necesajn negativojn, por ke ĉiu klubo poste povu ilin uzi. Aldone devas esti almenaŭ po kelkaj libroj pri ĉiu temo, mapoj (ekzemple: "Nia klubo korespondas" - mendmapo, kaj ĉirkaŭ ĝi belaj bildkartoj de tiuj lokoj, kie loĝas la korespondantoj), multkolera stando kun E-emblemoj kaj insignoj.

Por viaj prelegoj ne nur prenu ĉiun vi stokon da libroj, sed faru afiŝojn pri ĉiuj nomitaj temoj. Kaj por vi mem estoz pli facile prezenti faktojn pri Esperanto, kaj por la aŭskultantoj estos duobla impreso (funkcios kaj la aŭda, kaj la vida memoroj).

Fine mi substreku, ke: 1) ekspozicio estu akurata kaj bone rigardebla; 2) pri ĉiu aparta temo estu surskribo en korekta nacia lingvo kaj Esperanto; 3) desegnaĵoj nepre estu bonkvalitaj, surskriboj - grafike allogaj; 4) post la ekspozicio oni komencu novan E-kurson.

A. Medinš, estro de Propaganda fako.

NE UZU SUPERFLUAJN EPITETOJN!

En artikoloj, prelegoj kaj aliaj rimedoj de informado pri Esperanto svarmas misgvidaj esprimoj, kiuj kaŭzas malte da malbono al la pozicio de la lingvo. La Principaro de Kristavallen listigas la ĉefajn erarojn en p.13 (vidu mian artikolon en "A"-2(29), p.22), kie oni rekomendas ne apliki al la lingvo la epitetojn "artefarita", "helpa", "verda" k.s., sed ĉiam nomi ĝin aŭ la Internacia Lingvo aŭ Esperanto.

Bedauxinde ankoraŭ obstinas uso de "artefarita", "helpa" - esprimoj malĝustaj, nenecesaj, malutilaj. Pri "verda" ni eĉ ne parolu, ĉar verdaĵo povas esti folioj aŭ okuloj, sed ne lingvo.

Malĝustaj ili estas, ĉar ili ne respondas al la fakta karaktero de Esperanto. La lingvoj estas kreaĵoj de la socio, sed ne de la naturo. Lingvoj ne kreas sur arboj, sed formiĝas kaj evoluas en la seno de homaj kolektivoj. Ili estas regataj ne de biologiaj, sed de sociologiaj kaj lingvistikaj leĝoj. Tial ĉi ajn "biologiligo" de lingvo estas science malakceptebla. Necesas fine kompreni, ke tiurilate ne ekzistas principa, esenca diferenco inter Esperanto kaj la naciaj literaturaj lingvoj. Sekve, se al la angla, rusa aŭ kiu ajn alia lingvo oni ne aldonas la epitetojn "artefarita" aŭ "helpa" aŭ kiun ajn alian maltaŭgan, sed rilate al Esperanto oni tion faras, tiam kreigas superflua konfuzo kaj miskompreno. Per tio oni nur erare kredigas, ke Esperanto estas "kontraŭnatura", do io "nenormala" aŭ eĉ "morta", kompare kun la "normalaj", "naturaj" kaj tial "vivantaj" lingvoj. Pro la sama kaŭzo estas evitinde nomi ĝin Zamenhof "kreinto" aŭ eĉ "inventinto" de Esperanto. Li mem rigardis sin, tute prave, iniciatinto de la lingvo.

La du esprimoj - "artefarita" kaj "helpa" - estas ankaŭ tute nenecesaj. Ili estas eviteblaj sen kia ajn malĝustilaĵo. La kontraŭstarigo de "artefarita" aŭ "helpa" al "natura" aŭ "vivanta" estas malutila el ĉiuj vidpunktoj.

Tia nomigo kreas impreson, ke Esperanto tute ne povas funkcii kiel lingvo aŭ, en la plej bona kazo, ke ĝi estas nur ia surrogato de lingvo, per kiu oni ne povas esprimi la nuancojn kaj subtilaĵojn de la pensoj. Superflue diri, ke tia antaŭjuĝo, al kiu la eraroj en nia informado abunde kontribuis en la pasinteco kaj bedaŭrinde ankoraŭ kontribuas, grave obstaklas la normalan disvastigon de la lingvo en la vastaj popolterenoj. Krome, per tio ni mem liveras municion por la kanonoj de la konsciaj malamikoj de Esperanto.

Necesas ne forgesi la negativan efikon de tia endoktrinigo pri "artefariteco" je la mensoj de komencantoj: superflue kreigas ia danĝera komplekso pri malplivaloreco de Esperanto kompare kun la naciaj lingvoj, kio malhelpas la plenan ekregon de la lingvo. La fenomeno de "sternaj komencantoj" ŝuldiĝas almenaŭ parte al tiu psikologia aspekto.

Forigi maltaŭgajn kaj plene superflujajn epitetojn estas unu el la plej gravaj kondiĉoj por pli efika informado kaj prezentado de la Internacia Lingvo en ĉiasta lumo.

L i t e r a t u r o : I. Lapenna "Por pli efika informado", UEA,

1974. A. Medinâ "Denove pri informado", "Aktuale" N^o 2(29), p. 21-23.

A. Medinâ, estro de Propaganda fako.

REVU-15: IM-RESOJ DE NOVULO

En Permĵ la 7-an - 9-an de majo okazis la 15-a renkontiĝo de esperantistoj de Volgo kaj Uralo. Mi partoprenis en simila aranĝo unuafoje. Al mi, kiel komencanto, tiu ĉi vojaĝo estis utila tiel vidpunkte de organizo de la entrepreno, kiel de la praktika uzado de la lingvo. Kvankam la renkontiĝo estis mallonga, ĝi helpis en multaj rilatoj: iĝis pli komprenebla la senco kaj nuancoj de vortoj, foriĝis duboj pri ties uzado. Estas grava tio, ke aperis la deziro plu labori super mi mem pri la studado de la lingvo kaj la certeco pri ĝia ellerno. Mi konvinkiĝis pri tio, ke la internacia lingvo estas vivkapabla.

Mi rimarkis tion, ke dum la renkontiĝo grandparte partoprenis komencantoj, kiuj ne posedas la praktikon pri la aŭda percepto de la lingvo. Estas dezirinde, ke spertaj esperantistoj konsideru tiun ĉi fakton kaj parolu iomete pli malrapide kaj klare: ja tiaj renkontiĝoj havas instruan karakteron - oni lernas per la tusa praktiko.

Ekzemple, mi estis komprenanta en ĝenerala senco, kiam parolis B. Kolker, V. Aroloviĉ, L. Novikova, sed plenkompete komprenebla estis la parolo de Z. D. Skvorcova, kiu certgrade konsideris la lingvan nivelon de la partoprenantoj kaj parolis malrapide. Lau mia opinio, ju pli multe mi komprenus dum la konferenco kaj diskutoj, des pli utile estus por mi la vojaĝo.

Tamen tiu ĉi renkontiĝo, interkomunikiĝo kun homoj, kiuj libere posedas Esperanton, permasis al mi nun pli certe paroli en Esperanto. Estas rimarkinda ĝi ankaŭ pro tio, ke dum la renkontiĝo mi trovis fidelajn amikojn.

Por nia grupo ĉi tiu vojaĝo evidentiĝis utila ankoraŭ pro tio, ke unue nia esperantistino J. N. Kulikova sukcesis en la ekzameno, kaj due - la akiritan sperton ni povos apliki en la estonto.

La renkontiĝo tre plaĉis al mi. Dum longa tempo mi memoros kaj la inauguron, kaj la konferencon, spertitajn unuafoje, kaj certe la kantojn, kiujn mi aŭskultadis dum la admirinda bankedo.

Bedauras mi nur pri tio, ke ne partoprenis dum la solena fermo de la renkontiĝo. Tamen mi revenis hejmen pliriĝita per la sperto. Kaj jam baldaŭas mia unua E-tendaro.

V. Vjazovcev (Salavat).

LIA MOŝTO, LA VERDAJ OVOJ KAJ ESPERANTO

(aŭ kiel krasnojarskaj geesperantistoj akceptadis ĉi-maje novajn membrojn en la klubojn)

Fakte, se priskribi la tutan proceson de la baptado al la klubo membraro, do estos tro longa kaj enuolena raporto. Ni rakontu pli skize kaj mallonge.

Ĉi-jare en la urbo diversspecajn E-kursojn finis 32 homoj. Eble lau la kvanto tio estas sukceso, sed lau la kvalito - estonte montros...

Do, pri la vespero, kiun ni organizis la 22-an de majo, por "tapti" la novaperintan klubaron. Fakte okazis teatraĵo kun partopreno de ĉiuj ĉeestintoj. La ĉambrego en la urba Kulturpalaco havis "scenejon", kie situis Reĝa Konsilantaro, kaj du "landojn": Krokodilujo kaj Esperantujo. Memkompreneble en la unua troviĝis la baptatoj, en la alia - membroj de la klubo. Estis Heroldo (V. Elpaŝev), kiu deklaris la ordonojn de Lia Moŝto Kamarado Unua, la Reĝo de Esperantujo (V. Sapojnikov), estis Premier-ministro (S. Bronov) kaj

Grandfama Alkemiisto kaj Astronomo (A. Sutugina), kiu fritis verdkolorajn ovojn kaj manĝigis per ili ĉiun freŝbakitan esperantiston. Estis la membroj de Reĝa Konsilantaro, plenumintaj laŭ laŭn rolojn respondece kaj serioze. La nova esperantistaro akceptis la Verlegan Suron kaj ricevis la atestojn, antaŭe formanginte la verdkoloran ovajon, kiu estis preparita, kiel oni diris, el ...iliaj pekoj. Estis multe da vidindaĵoj. Sed ŝie rapide finiĝis, kaj jen antaŭ ni - 26 novaj gesperantistoj, membroj de la klubo.

Denove ni prezentis la faman teatraĵon "Dia puno", kies aŭtoroj estas multaj partoprenintoj de BET-17, inter ili G.M. Gercikov, V. Saĵnikov, M. Miĉurina k.a. La krasnojarskanoj fakte jam fondis ĉe la klubo amatoran teatran grupon kaj komencis maturiĝi en la nefacila aktora laboro. Multe ridis la ĉeestintoj pri la bona ludo de la debutantaj aktoroj: G. Butenko, I. Danilin, M. Miĉurina, N. Sutugina, T. Kapustina, O. Semjonova, A. Rostovcev kaj aliaj.

Poste okazis la bankedo, dum kiu oni diris multajn bonanimajn vortojn pri la novuloj kaj pri la klubo. Dancej, dancej kaj ludoj... Kaj denove la dangoj.

Funkciis ankaŭ E-eksponcio. Malgraŭ ŝio, la movado en nia urbo plifortiĝas kaj iĝas pli diversflanka. Certe plimultiĝas la zorgoj, sed la intereso de la klubo, ĝia allogeco - antaŭ ŝio! Kaj ni agas por tio ŝi.

V. Kamaxado.

PRI E-LITERATURO -- AL LA VASTA PUBLIKO

La plej grava kulturrevuo de Latvia SSR "Karogs" ("Standardo", eldenkvanto 35 000), organo de Latvia Asocio de sovetaĵ verkistoj, publikigis en N^o5 du informkarakterajn artikolojn de latva poeto kaj esperantisto H. Skuja. La unua artikolo koncize informis pri la eldona aktiveco de estona libroeldonejo "Eesti Raamat" - plurfoja aperigo de E-lingvaj turismaj broŝuroj pri Estonio, Tallinn. Precipe estis atentita tiu fakto, ke la estonaj samideanoj bone aplikas Esperanton en popularigado de sia nacia literaturo, kulturo eksterlande. La aŭtoro menciis la jam aperintajn librojn - estonan nacian eposon "Kalevipoeg" en la brila traduko de H. Dresen, "Kusantan tigron" de L. Promet, "Okupacion" de B. Krusten, sciigis pri la ĵus aperinta romano "La mastro de Kõrboja" de la estona klasikulo A.H. Tammsaare, anoncis la aperon de "Estona soveta poezio".

La dua artikolo, titolita "En Esperanto", konigas al la neesperantista leganto la kulturrolon de la internacia lingvo Esperanto. La aŭtoro skize rakontis pri la faritaj tradukaĵoj en Esperanto, ke jam multaj ŝefverkoj, klasikaĵoj de naciaj literaturo, estas esperantigitaj kaj tiel atingiblas por vasta internacia legataro. Sekvis informoj pri la plej freŝaj klasikaj tradukaĵoj de Tagore "Balsata ŝtono" kaj "Bhagavad Gita", kaj pri la novaperonta libroserio de Hungara E-Asocio.

T. Bercis (Riga).

MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO

LA REDAKCIO RICEVIS

- la informilon "Lumo verda" N^o3(16). En la numero: Ŝefartikolo "Dujara jubileo de nia klubo", konstanta rubriko "La klubanoj prezentas sin", informoj pri abonado kaj libromendado, "literatura panoramo" kun multaj originalaj kaj tradukaj kontribuaĵoj de la klubanoj, k.a. Suplemento al la numero enhavas la raporton de la prezidento de la interurba klubo "Antaŭen" B.G. Kolker "Nia bravoga anaro" kun mencioj pri atingoj de ĝia unuopa el la kollektado de klubanoj, kaj liston de utilaj adresoj (precipe de SRJM-funkc'uloj).
- presitan programon de studenta scienca konferenco, okazinta la

31-an de marto 1977 en la fremdlingva fakultato de Barnaula pedagogia instituto. Inter diversaj sekcioj de la konferenco estas menciita la interlingvistika sub gvido de D.G.Lukjanec. La programon de la sekcio konsistigis raportoj: 1) "Poeziaj ebloj de Esperanto (surbaze de anglaj aŭtoroj)" - N.Stal'kun; 2) "La ideo de IL kaj ĝia esprimo en la nuntempa interlingvistiko" - V.Jedryševa, N.Kukarina; 3) "Problemoj de gramatika konstruo en la internacia lingvo Esperanto kompare kun la gramatika konstruo de la angla lingvo" - N.Kukarina, T.Arjanceva; 4) "Poeziaj ebloj de Esperanto (surbaze de francaj aŭtoroj)" - G.Soboleva.

PROPAGANDA FAKO REMEMORIGAS

Kunlaborantoj, kiuj promesis verki artikolojn por "Manlibro de Aktivulo", ne prokrastu vian laboron - eldono de ĉi tiu vere necesa libro dependas de vi mem!

NOVA ESPERANTO-SEKCIO

Komencis labori la 16-an de majo en la malfermiĝinta Klubo de internacia amikeco ĉe Siberia teknologia instituto (Krasnojarsk). La 10-tagan elementan kurson laŭ la lernolibro de B.G.Kolker, kiun 4-foje semajne gvidas I.M.Danilin, frekventas 24 homoj. La sekcio estas organizita kiel filio de Krasnojarska E-klubo.

PORPAGA AKTIVADO

La Klubo de Internacia Amikeco ĉe la 43-a profesi-teknika lernejo en Avdejevka sendis leteron al Ukraina respublika pakekomitato, en kiu oni esprimas subtenon al la pacama ekstera politiko de KRSU kaj Soveta registaro. En la letero, subskribita de la lerneja gvidantaro kaj aktivulej de la klubo, oni rakontas i.a. pri la vasta E-korespondado de la klubo kaj pri la sindevigo organizi amasan laboron de la gelnantoj por la Pacfonduso.

DEZIRAS KORESPONDI

- E-klubo - kun junularaj E-grupoj en Sovetio. La adreso: E-klubo, Ifjúsági Ház, H-9022 GYŰR, Árpád ut. 44, Hungario.
- E-klubo, por havi seriozajn kontaktojn kun aliaj E-klubo el Sovetio; la geklubanoj (15-16-jaraj) - kun gesamidesanoj el diversaj respublikoj. La adreso: 343871 Doneckaja obl., Avdejevka, Poŝtovaja 23, GorSPTU-43, interklub "Esperanto". La gvidantino de la klubo serĉas leterkontaktojn kun kolegoj - instruistoj: 343871 Avdejevka-3 Doneckoj obl., Gagarina 23 - 37, Vojn. roviš A.I.

PREGIZIGO

La kunvenoj de MIEK (vidu "A"-9, p.100) ekde la 22-a de junio okazos en la ruĝa anguleto ĉe SMU-5 de "Metrostroj" - per. Janyševa, 7 (metrostacioj "Kalininskaja", "Arbatskaja", "Biblioteka Lenina").

ATENTU, AŬTOROJ!

Por ke la legantoj sukcesu ĝustatempe ricevi la julian numeron - la lastan antaŭ SEJToj kaj Konferenco - la fermodato estas forŝovita de la 10-a al la 1-a de julio. Rapiĉu kontribui! Ne preterlasu la lastan momenton! Jam nun vi povas gajni poentojn al la konto de via klubo por la venonta agadjarro!

La redaktoro.

La informilo estas uzenda nun enlande! Fintejpita 16.6.77.
Ĉiujn materialojn por "Aktuale" sendu laŭ la adreso de la redaktoro:
121019 Moskvo G-19, de vestrobevanija, Axoloviču Viktoru Semjonoviču.